# Informilano

Informilo de Milana Esperanto Klubo

**ANNO LXVII** **Marzo - Aprile 2018**

INDICE

- I nostri prossimi giovedì
- Lingvistika Laboratorio
- FEI invitas vin al lingvistika Laboratorio
- L'85° Congresso Italiano a S. Marino e la sua Accademia
- La 70ª Kongreso de la E-fervojstoj
- La programo de Esperanta Kastelo de Gresillon
- Eŭropa projekto "Multlingva akcelilo"
- Sporta ferio kun Grupo Esperanto Tigullio (13-17/8/18)
- Un appello della nostra s-anino Ida Bossi
- Estrarkunsido
- Niaj pasintaj ĵaŭdoj
- Turismo per Esperanto
- Notizie dal mondo

**Circolo Esperantista Milanese**
Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 3474262214
*e-mail:* esperantomilano@yahoo.com
*rete:* http://milano.esperantoitalia.it/
*C.C.P.* 26448209
*IBAN:* IT36 J076 0101 6000 0002 6448 209

## I NOSTRI PROSSIMI GIOVEDÌ ore 21,15

*aperti a tutti gli interessati: soci e non soci*

**Giovedì 1° marzo**

**RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

sempre aperta a tutti

**Giovedì 8 marzo**

Dopo il conviviale incontro in pizzeria, (h.19.30 da "Il Faraone" - Via Masolino da Panicale 13. Prenotarsi in sede o presso Rodari, Tel. 02-2364190) in sede ritorna il s-ano dott. *Nicola Minnaja* con una conferenza su:

**LE LINGUE INVENTATE A SCOPO LETTERARIO:**
**DA DANTE A DARIO FO**

**Giovedì 15 marzo**

**TRAFOLIUMANTE LA ESPERANTISTAN GAZETARON**

**Giovedì 22 marzo**

**LA TRADUKA RONDO**

**Giovedì 29 marzo**

**KONVERSACIA RONDO**

**Giovedì 5 aprile**

preceduta da un simpatico incontro in pizzeria (da "Il Faraone" con le solite modalità) in sede una conferenza del prof. *Giorgio Silfer,* di nuovo nostro gradito ospite. Collegandosi al suo anniversario, il tema sarà

**LA SES BIOGRAFIOJ PRI ZAMENHOF**

un conciso raffronto fra le opere di Privat 1920, Boulton 1962, Maimon 1978, Banet-Fornalowa 2001, Korjhenkov 2009, Zelazny 2012.

**Giovedì 12 aprile**

**KRUCVORTOJ**

**Giovedì 19 aprile**

Il piacevole prologo in pizzeria (h. 19.30 da "Cicciobello" in via degli Ailanti 3 con le solite già citate modalità) introdurrà l'annuale

**ASSEMBLEA DEL CIRCOLO ESPERANTISTA MILANESE**

Un diritto e un dovere: tutti i membri sono invitati a partecipare.

**Giovedì 26 aprile**

**KONVERSACIA RONDO**

**Giovedì 3 maggio**

**RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

sempre aperta a tutti

**Giovedì 10 maggio**

**LA TRADUKA RONDO**

**GLI "INCONTRI DI CONVERSAZIONE"** del mercoledì in sede proseguono regolarmente dalle ore 17 alle ore 19.

## LINGVISTIKA LABORATORIO

La 25-an de februaro 2018, ĉe la sidejo de la Milana Klubo, okazis la Laboratorio pri Esperanto kies celo estas la prezentado de la Internacia Lingvo al neesperantistoj. Ĝi estis la dua fojo por tiu manifestacio post la unua evento de la 30-an de septembro 2017 kaj ankaŭ ĉi-jare kunlabore kun la Turina E-Centro.
La partoprenantoj estis 12, preskaŭ ĉiuj junaj studentoj. Tio konstituas tre bonan sukceson precipe se oni konsideras ke en 2017 ni havis nur unu partoprenanton.
De E-o Turina Centro venis Alberto Vitale kaj Carlotta Pavese kiuj havas grandan sperton pri la organizado de tiaj eventoj ne nur en Turino sed ankaŭ en aliaj urboj. Ĉe nia klubo s-noj Gianni Conti, Giovanni Daminelli kaj Francesco Fagnani preparis la eventon.
La Laboratorio komencis je la deka horo matene. Vitale priskribis la fundamentojn de la esperanta gramatiko per multaj ekzemploj partoprenigante aktive ĉiujn junulojn kaj ilustris koncize la

historion de la esperanta movado. Daminelli informis pri la ĉefaj kursoj de Esperanto kaj Pavese kaj Fagnani parolis pri nia asocia vivo kaj pri la ĉefaj naciaj kaj internaciaj kongresoj aŭ renkontiĝoj.
La junuloj partoprenis kun granda atento kaj intereso. Fakte la plimulto konis nenion pri la internacia lingvo kaj tre miris ke ili povas iomete kompreni la lingvon kaj vortigi simplajn frazojn jam post nur tri horoj da leciono.
Krome ĉio disvolviĝis en etoso de granda gajeco kaj amuziĝo.
Do, certe estus bone ripeti tiun ĉi manifestacion ankaŭ la venontan jaron.

*Bruno Marcandalli*

## FEI INVITAS VIN AL LINGVISTIKA SEMINARIO

**Kiel prezenti esperanton en lernejoj per 1-4-6-horaj kursoj.**
Karaj samideanoj,
En la lastaj jaroj ni ĉiam pli forte konscias, ke la estonto de Esperanto estas en lerneja instruado. Kelkfoje presentiĝas ŝanco enkonduki Esperanton en lernejojn, sed ofte manko de sperto kaj materialoj ne permesas trafi tiujn gravajn okazojn adekvate. La printempa seminario organizata fare de la Eduka Komisio de la Itala Esperanto-Federacio emas solvi tiun problemon, montrante italajn aŭ internaciajn spertojn kaj komparante jam sukcese uzitajn formulojn. Ĝia titolo estas **"Mallonge enkonduki Esperanton en lernejojn"** kaj la tri ĉefaj fokusoj estos la analizo de Unu Leciono pri Esperanto de ILEI, lernejen enkonduka kurseto de Lu Wunsch-Rolshoven kaj reelaborado je tiu celo de la Torina Kurso de Pedro Aguilar Sola.
La seminario okazos en la alloga mara pejzaĵo de **Marina di Pietrasanta, de la 28-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2018.** Krome, ekskurso eblos la 1an de majo por plie ĝojemuloj. La vesperaj prezentadoj inkluzivos la kantojn de Jomo kaj Piero Nissim.
Varme vin invitas lerni kaj ĝui kune, la Eduka Komisio de FEI
(L. Brazzabeni, B.Casini, R. Franceschini kaj A. Madella)
**Prezo** por la 3 tagoj: 230 euro inklzive de loĝado kaj manĝoj,
Por aliĝi bonvolu uzi la aliĝilon ĉe *www.lingvaseminario.it* aŭ sendi retpoŝtmesaĝon al laura.brazzabeni@alice.it

## L'85° CONGRESSO ITALIANO A SAN MARINO E LA SUA ACCADEMIA

Ottime le prospettive del prossimo congresso programmato dal 18 al 25 agosto prossimo. Oltre ai programmi istituzionali, ecco quelli culturali e serali, i concerti di Jomo, belle gite (Ravenna, Urbino...)
San Marino è la sede della nota "Akademio Internacia de Sciencoj"
Quest'anno uno dei due seminari del mattino sarà sostituito da tre suoi corsi giornalieri presso il Salone Titano così articolati:
h. 08,30 – 09,30 kurso pri ĝenerala lingvistiko (prof.. Davide Astori)
h. 09,30 – 10,30 kurso pri Movoj en nia Galaksio (prof. H. Maitzen)
h. 10,30 – 11,30 kurso pri Astrobiologio: la eblecoj por vivo ekster-tera (prof. Amri Wandel)

## LA 70a KONGRESO DE LA E-FERVOJSTOJ

La 70-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio okazos en Pollando, en urbo Wroclaw de la 19a ĝis la 25a de majo 2018. Sekvos dum la tri postaj tagoj postkongreso en Krakovo.
Atendos vin ne nur fakaj programoj, sed ankaŭ programeroj por la amikoj kaj simpatiantoj de fervojo, riĉa kultura programo (prelegoj, spektakloj, koncertoj, dancvespero) kaj vizito de unu el la plej belaj regionoj de Pollando.
Krome, la interesitoj povas ĉeesti E-kurson por komencantoj, atelierojn pri informadiko cele sin iniciati en la praktika uzo de diversaj programoj (Vikipedio, FB, Google, ktp) kaj vizito al Fervoja muzeo en Jaworzyna Śląska.
Libroservo kaj diversaj ekspozicioj pliriĉigos la programon.
Ĉiuj esperantistoj kaj amikoj estos bonvenaj.
Por pluraj informoj kaj aliĝo: *www..ifef.net* aŭ *https://ifef.vroclavo.damj.es*

## LA PROGRAMO DE ESPERANTA KASTELO DE GRESILLON

**De la 20a ĝis 28a de aprilo** 2018 okazos la 8-a **staĝo PRINTEMPaS**

- Kurso A1-A2 gvidata de Marion Quenut (Tuluzo)
- Kurso A2-B1 gvidata de Christophe Chazarein (Tuluzo)
- Kurso B1-B2 gvidata de Zsófia Kóródy (Herzberg)
- Internaciaj KER-Ekzamenoj (27-28 aprilo)

**La fama Kulturdomo anoncas parton de siaj programoj por 2018:**

2018-majo-09/13 --- *Korusa renkonto* de Interkant'
2018-majo-09/13 --- *ReVe*, Renkontiĝo Vegana
2018-julio-09/27 --- Maratona Esperanto-kurso dum ĝis 18 tagoj
2018-julio-16/21 --- *Speciala semajno* kun Turismaj vizitoj
2018-julio-21/27 --- *Internacia E-Konferenco* de OSIEK «Esperanto en Artoj»
2018-aŭgusto-11/19 --- *Festa Semajno* por infanoj kaj familioj
---Maison Culturelle de l'Espéranto Grésillon, St. Martin d'Arcé 9150 BAUGÉ-EN-ANJOU France *http://www.gresillon.org/* *kastelo@gresillon.org*

## EŬROPA PROJEKTO „MULTLINGVA AKCELILO“

Ĝin financas Eŭropa Komisiono kaj ĝiaj partneroj estas ok: la ĉefa en Zagrebo, tri el Slovenio kaj unu el Slovakio, Germanio, Danio kaj Bulgario. Ĝi startis en 2017 kaj finos en decembro 2019. La celo estas produkti lernprogramon pri lingvoj por triaklasanoj de bazaj eŭropaj lernejoj (post la angla, nun la unua fremdlingvo). Por plirapidigi la lernadon oni uzos nunan informatikan teknologion kiel portalo por instruistoj kaj gelernantoj. Krom la du lernohoroj en la lernejo semajne la gelernantoj lernos ĉiutage, ricevante dekon da demandoj al kiuj ili skribe respondos. Poste laŭ la projekto oni elprovos la tuton dum kurseto. Esperanto havas en tiu enkonduka lernobjekto propedeŭtika rolon konstatante ke 240 plej oftaj morfemoj kovras 80% de praktika parola lingvo. kaj ili estas inter la plej oftaj esperantaj morfemoj de Esperanto. La plej oftaj estis farita baza lernolibro de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo.

La una fazo de la projekto okazos jam antaŭ la fino de la lernojaro 2017/2018, kaj la partneroj okazigos renkontiĝon en septembro en Bratislavo por analizi ĝiajn spertojn, antaŭ ellabori definitivan didaktikan materialon por unujara lernobjekto el 64 lernohoroj.

## SPORTA FERIO KUN GRUPO ESPERANTO TIGULLIO (13-17aŭgusto 2018)

Ĝi organizas **sportan ferion por esperantistoj** tuj antaŭ la 85a Itala Kongreso de Esperanto 2018 por praktiki marajn sportojn kune kun samideanoj. La loko troviĝas en Riva Trigoso vilaĝeto kun granda plaĝo, proksima al la fama Sestri Levànte. En programo:

**Biciklado:**
Ĝi okazos sur la spektakla biciklovojo Framura-Lévanto, apike super la maro; dumvoje eblas halti en belegaj plaĝoj por bani sin kaj tagmanĝi piknike. La bicikloj estos luataj por kvar tagoj je € 30.

**Kanuado:**
La kanuado okazos sur la maro en Golfeto de la Fabeloj kaj Golfeto de la Silento de Sestri Levànte. Ĝi daŭros la tutan tagon. Kanua instruisto estas je dispono senpage. Probable eblos ankaŭ fari noktan kanuadon. (€ 30 po kanuo po tago).

**Velboatado:**
La velado okazos en la marbordo de Sestri Levànte ĝis Monèglia kaj daŭros duonan tagon (€ 50 po persono).

**Piedmarŝado:**
La piedmarŝado okazos en la tre famaj Kvin Landoj ("Cinque Terre") kaj daŭros la tutan tagon. (eniro en la pado € 8 kape).

**Per dettagli ed iscrizioni:**
*www.nodobandiera.it/attivita/2018/Plursporta-Mara-Ferio-2018/*

## UN APPELLO DELLA NOSTRA S-ANINO IDA BOSSI

Nei prossimi mesi andrò in Etiopia con dei medici oculisti per aprire l'ambulatorio della Clinica Oculistica che – con l'aiuto anche di alcuni di voi - abbiamo costruito a Jajurat. I medici che avvieranno l'ambulatorio fanno parte dell'associazione di oculisti volontari di Tarquinia MWA (*www.worldmedicalaid.org*), che opera anche in Africa, e che mi ha procurato, a prezzi molto convenienti, la strumentazione necessaria per far partire l'ambulatorio per visite, diagnosi e le prime cure.

Seguirà successivamente anche l'apertura della parte chirurgica.

Se avete occhiali da vista e/o da sole che non usate più, le cui lenti non siano rigate, vi sarei molto grata se poteste donarmeli perché saranno utilissimi per coloro che ne avranno bisogno, ma che non hanno i mezzi per acquistarli. L'ambulatorio di Jajurat è situato in una zona molto povera dove i problemi alla vista, se non curati, portano alla cecità. Vi ringrazio anticipatamente.

Un cordiale saluto. *Ida*.Tel 340 3653717

## ESTRARKUNSIDO

La 11an de januaro okazis la unua estrarkunsido de la nova jaro per legado kaj aprobo de la antaŭa protokolo. La sekretario donis provizoran indikon pri la pasintjara administrado de la klubo: la bilanco estas je la fino pozitiva je pli-malpli € 950 ankaŭ se la jara konflikto kun la luanta M.M. denove haltiĝis pro nova erara sendo de jara saldo. Pasintjare ne okazis altaj elspezoj kaj oni ne presis informilojn. Ankaŭ por la nuna jaro oni neantaŭvidas elspezojn tro gravajn.

Estis konfermita la dato de la 24a de februaro por la nova "Lingva Laborejo" kunlabore kun la torinaj s-anoj. La programo estos simila al la antaŭa sed oni plibone zorgos la organizadon kun pli da atento al la universitata medio, plibona utiligo de Facebook kaj forigo de la malutila kaj seninflua aliĝkotizo. Poste oni analizis la proponon de la Hanoja E-Asocio pri ĝemeliĝo inter la du Grupoj.

La sekretario memorigis la ekziston de la konvencio subskibita en 2002 en Hanoj, fare de nia prezidanto, pri reciproka kunlaborado. Praktike okazas nur sendado de bulteno. Sed oni decidis jese al la propono kvankam Milano jam havas plurajn ĝemeliĝojn, kutime kun la duaj urboj, ne la ĉefurboj, de la ŝtatoj kaj ĉiokaze la du urboj ne estas ĝemeligitaj. Poste oni vidos la reagon al nia respondo.

Fine la sekretario informis ke prof. Davide Astori jam interesiĝas por klopodi aranĝi unutagan kunvenon en Milano, kunlabore kun la Komunumo, pri d-ro Filippetti, milana urbestro kaj esperantisto. Kompreneble nia klubo estas je kompleta dispono. Bedaŭrinde ni ne havas konatulojn tie.

*E.R.*

## NIAJ PASINTAJ ĴAŬDOJ

La 18an de januaro nia s-ano Gianni Conti bone regis la vesperan programon per sia serioza prelego, kvankam oni havas iomete da nostalgio pri liaj antaŭaj kabaredaj prezentadoj, viglaj kaj spritaj. Ĉifoje li komentariis temon kiun la astronomo kaj matematikisto A. Zichichi pritraktis en sia libro "Kial mi kredas je tiu kiu kreis la mondon". Ekante de provoka letero de iu ateisto al li la temo estas la kutima debato pri du malfacile kredeblaj asertoj: la tuta mondo kaj ĝia vivo estas la rezulto de sinsekvaj evoluadoj (inter ili tiu kiu ebligis atingi la homon startante de iaj simplaj organikaj molekuloj) aŭ la kreado de iu mistera Ulo, perfekta kaj ĉiopova, kiu ekzistis tra la tempo ĉiam. Al la evoluada ĉeno mankus kelkaj ĉeneroj post tiuj de la komenca eksplodo kaj de la alveno de la akvo kaj de la unuaj vivoj. Krome la preleganto, kiel klarigo, montris kelkajn aĵojn (sablo, feraĵo, lignaĵo, akvo): ĉiuj ene konsistas el samaj neŭtronoj, kun protonoj kunligitaj al elektronoj. Ankaŭ Lavoisier estis citita kun sia fizika leĝo. Ĉio klarigebla per evoluado? Ne, li respondas

kaj la mirakloj estas evidentaj pruvoj (inter ili la ĉefa ne diskutebla estus tiu de la sanktaj stigmatoj). Je la fino kelkaj intervenoj: inter ili tiuj de s-anoj Veronesi, tre interesa kaj enfokusigita, kai Rodari. Samtempe okazis neatendita donado de ujoj kun floroj de kikinger.
La 15an de februaro okazis la tradicia "Vespermanĝo de Amikeco" ĉe la restoracio. Malgraŭ kelkaj lastmomentaj rezignoj, dudekkvino da amikoj kaj samideanoj travivis kune gajan vesperon. La tre riĉa kaj abunda menuo kaj la taŭgaj trinkaĵoj helpis krei amikan etoson. Ankaŭ ĉifoje la neĉeestantoj malpravis.

## TURISMO PER ESPERANTO **http://www.karavane.net**

L'organizzazione turistica del s-ano Aldo Foà (via Casale 7, Milano, tel: 02 58111573, al mercoledì ore 17.30-19.00 oppure sempre al numero 3471709286 alle ore 10.00-19.00) annuncia i suoi prossimi programmi del 2018:
**Pasqua nella Valle del Reno – 30 marzo /2 aprile – Quota € 279**
In pullman a Magonza, Heidelberg, Coblenza, il monastero di Eberbach e la navigazione sul tratto più spettacolare del fiume.
**Da Paestum all'isola di Capri 27 – aprile /1° maggio – Quota € 295**
In pullman attraverso il Cilento, con Paestum, la Certosa di Padula, Capo Palinuro, Capri, la Grotta Azzurra, il Giardino d'Augusto, ecc.

## NOTIZIE DAL MONDO

**Marina di Ascea (SA) –** Il più che noto Festival Internazionale della Gioventù si terrà in questa bella località dal 28 marzo al 3 aprile. Per ogni informazione *www.iej.esperanto.it* iej@esperanto.it
**Stoccolma –** La Esperanta PEN-Centro propone il prof. Giorgio Silfer come candidato al Premio Nobel 2018 per la Letteratura.
**Verdello (Bergamo) –** Nella locale scuola, il quinquennale corso di esperanto, che lo scorso anno iniziò nuovamente in una prima classe elementare, ora prosegue in seconda con i suoi 27 alunni.
**Madrid –** Qui si svolgeranno il 77° Congresso spagnolo d'Esperanto dal 20 al 22 luglio prossimi ed anche il 51° Congresso dell'ILEI, gli insegnanti di esperanto, dal 21 al 28 luglio. Possibilità di iscriversi ad entrambi a prezzi scontati (ridotti fino al 31 marzo).
*www.ilei.info/agado/konferencoj.php www.esperanto.es/kongreso*
**Cassino –** Il 20 febbraio presso la scuola media Conte è iniziato un corso settimanale di esperanto con l'aiuto del Gruppo di Grosseto.
**Almada (Lisbona) –** In occasione del Congresso Universale, dal 28 luglio al 4 agosto in questa località a 10 km si terrà il 47° Internacia Kongreseto, riservato ai figli dei congressisti. Possibilità per i genitori di pernottarvi. Tutte le informazioni su *bertosch.free.fr/iik2018*
**Montreal –** Questa bella città del Quebec ospiterà il 105° Universala Kongreso dell'UEA nel 2020, per la seconda volta in Canada. Il primo ministro Trudeau ha già inviato un messaggio di sostegno e di benvenuto. Come è noto quello del 2019 sarà a Lahti (Finlandia)
**Kunming (Cina) –** Sono un migliaio gli studenti di 15-18 anni che da settembre frequentano il corso di esperanto presso l"Artkolegio" cittadino. Tra i più attivi promotori di questa eccezionale iniziativa c'è la italiana prof.ssa Alessandra Madella di Parma, membro del Consiglio Nazionale della FEI ed attualmente colà residente.
**Bologna –** Nel quadro della "Settimana dell'Amicizia Internazionale" presso il "Centro Sociale 2 agosto" il Gruppo Esperantista Tellini ha realizzato un incontro su "Amicizia e comprensione reciproca".
**Trieste –** L'Associazione Esperantista Triestina in occasione della "Giornata della Lingua Madre", in collaborazione con"Amici della Gioventù Musicale di Trieste ha organizzato un concerto "7 note per la pace" con il sostegno della Regione.